TEA-BULTENO

1ª JARO | SEPTEMBRO 1998 | NUMERO 7

AGENDO

1	M	Reek' al labor': ordigo de la arkivo
2	M	
3	Ĵ	
4	V	Raporto pri la Itala Kongreso en Frascati
5	S	
6	**D**	
7	L	
8	M	Ordigo de la arkivo
9	M	
10	Ĵ	
11	V	Sen-tema babilado
12	S	**Esperanto en Mantuo** (vd. dorspaĝe)
13	**D**	**Festo de Amikeco - Dreiländerecke**
14	L	
15	M	Ordigo de la arkivo
16	M	
17	Ĵ	
18	V	Impresoj pri OSIEK-Konferenco
19	S	
20	**D**	
21	L	
22	M	Parolas la unuafojaj kongresanoj
23	M	
24	Ĵ	
25	V	Pri la 83ª UK en Montepellier
26	S	
27	**D**	
28	L	
29	M	Ordigo de la arkivo
30	M	

Vortoj de la redakcio

Kara Leganto!

Jen denove en viaj manoj via asocia bulteno! En aŭgusto ĝi tute ne aperis: ni ja paŭzis post la laboroj por Internacia Esperanto-Konferenco '98 kaj antaŭprepare al UK, kaj ankaŭ pro la terura varmo kiu sufoke senfortigis nin. Eble vi eĉ ne rimarkis ĝian ne-aperon, pro troa okupiteco, ĉefe rilata al pretigo de valizoj por alvojaĝi al diversaj Esperanto-renkontiĝoj. Kie vi esperantumis? Ĉu vi freneze amuziĝis? Kiom da novaj amikoj vi akiris? Kiom da belaj panoramoj vi ĝuis?

Rekorda estis ĉi-jare la partopreno de TEA-anoj en la Universala Kongreso: entute 14! Ni povas esti fieraj pro tio! Kaj nun, tre scivoleme, oni atendas aŭdi la impresojn precipe flanke de la unuafojaj kongresanoj.

Sed ni iomete retrorigardu al la laste organizita aranĝo de nia asocio, nome al OSIEK-Konferenco. Fakte pri tiu evento mankis tempo por kune priparoli, por diskuti pri ĝia disvolviĝado, por kritiki la mankojn, la fuŝojn kaj por kune serĉi novajn vojojn al plibonigado de nia estonta agmaniero. Laŭ diroj kaj laŭ subaŭskultadoj ĉio iris bone: la kutima etoso, agrabla, amikiĝema kaj entuziasma, kiu akompanadas tiujn konferencojn, plej sukcesigis la triestan rendevuon. Dum IEK '98 estis atribuita la OSIEK-Premio al **Claude Piron** por la libro LA BONA LINGVO kaj krome estis elektita la urbo kiu gastigos la venontjaran IEK-on: **Metz**, Francio (17-23 julio 1999). Tie oni priparolos la jenan temon: MONO KAJ CIVILIZO.

Do, fine oni povas aserti ke la organiza teamo estis kontenta pri la rezultoj kaj kio plej ĝojigis ĝin, estis la fakto, ke, por la lastmonataj preparoj kaj dum la konferenca semajno, prezentiĝis tuta «skipo» da vigla, iniciatema kaj ege agema helpantaro (plejaltprocente konsistanta el virinoj!) kiu per sia konstanta kunlaboro valore kontribuis al la glata funkciado de la aranĝo. Korajn dankojn al ĉiuj!

Nun, post la somera libertempo, ni revenas al la rutina asocia agado. Oni ne promesas al vi fantastajn amuziĝojn aŭ spektakloriĉajn prezentaĵojn, sed simplajn programerojn, kiajn vi povas vidi en la ĉi-apuda agendo, sed memoru ke por nia asocio tre gravas via konstanta ĉeesto, ĉar ideoj kaj proponoj por ontaj programoj naskiĝas nur kiam oni daŭre interrilatas unu kun la alia, kiam oni mergiĝas en la funkciado de la asocio, kiam oni pli profunde konas la aliulon.

Helpu la estraron en sia engaĝiĝo cele al disvastigo de la internacia lingvo en nia ĉirkaŭaĵo, ĉar ja vi mem spertis kiom riĉiga, kulture, socie kaj homece, Esperanto estas, kaj do, ĝi certe meritas iom da via tempo: ĉu ne?